

- ★ Novaj Honoraj Membroj / 6
- ★ Unesco kaj Esperanto / 7
- ★ Zamenhofa Metiejo / 8

Eĥoj el la 6-a Kongreso: Amikeco, amuziĝo kaj animo



6-a Kongreso
KUBA ESPERANTO-ASOCIO
Havano / 18-22 novembro 2015

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco

Post 10-jara paŭzo interkongresa, okazis en Havano la 6-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio, kiel planite, de la 18-a ĝis la 22-a de novembro, kies temo estis “Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco”.

La kongreson partoprenis 134 geesperantistoj el 10 landoj, el ili 22 eksterlandanoj (el Belgio, Brazilo, Germanio, Hispanio, Islando, Kanado, Nederlando, Rusio kaj Usono) en la sidejo de la Nacia Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruĝinĝieroj, en la moderna urbocentro.

La kongresan temon reĝisoris Maritza Gutiérrez González kiu prezentis ĝin kun la kontribuo de Ismary Lezcano García kaj Maria Antonia Cartaya kiel unua programero.

Elstaraj gastoj de la kongreso estis d-rino Sabine Fiedler (Germanio) kaj d-ro Duncan Charters (Usono) kiuj ankaŭ prelegis pri siaj respektivaj agadkampoj, nome, la Esperanta frazeologio kaj Esperanto-instruado kaj teknologioj. La kongreson ankaŭ ĉeestis d-ro Orlando Raola, prezidanto de Esperanto USA, kiu estis unu el la prelegantoj lige al la kongresa temo en la verko de la nacia heroo de Kubo, José Martí.

Ili ĉiuj aktive partoprenis en la Lingvistika Simpozio okazinta tuj antaŭ la kongreso,

la 17-an, en la Salono 250-a Datreveno, en la Havana Universitato pri “Esperanto: lingva kaj socikultura fenomeno”. La simpozion kunaŭspiciis la Instituto pri Literatura kaj Lingvistiko de Kubo, la Centro pri Aplikata Lingvistiko kaj KEA kaj partoprenis kubaj fakuloj el la menciitaj institucioj, la Pedagogia Universitato de Havano kaj la Centra Universitato de Las Villas, inter alie.

Aliaj programeroj kongresaj estis laborkunsidoj de la kuba ILEI-Sekcio, Junularo kaj la Komitato de KEA, en eksterordinara sesio, kiu elektis 5 novajn Honorajn Membrojn pro elstara agado por Esperanto dum pli ol 30 jaroj.

Okazis ankaŭ du paroligaj kursoj kun ĉesto de pli ol 30 geesperantistoj; libreprezentoj, kiu inkluzivis la verkon *El Esperanto en Cuba (1904-1973)* de Juan Ramón Rodríguez, estrarano de KEA kaj historiisto de la Asocio; krome, aliaj libroj eldonitaj de Monda Asembleo Socia (MAS) estis prezentitaj de Vilhelmo Lutermano, inter ili *Nia vortaro por latinamerikanoj* verkita de Alberto García Fumero (Kubo) kaj Guido Hernández (Kostariko).

La interkona kaj arta vesperoj estis ankaŭ fokusitaj al la kongresa temo, tial plenaj je

muziko, kubaj kantoj kaj dancoj, kiuj prezentis nian kulturan riĉecon deveninta el kunfandiĝo tiel hispana kiel afrika; deklamado de poemoj kaj korusa prezento formita el kubaj kaj eksterlandaj kongresanoj ankaŭ ornamis la artan vesperon kiu allogis la kongresanojn. Ekskursiva programo antaŭ-, dum- kaj postkongresa ne mankis.

Kiel plia rezulto evidentiĝas, ke la antaŭkongresaj eventoj kune kun la kongreso mem, estis atentokaptaj kaj instigaj por la kuba esperantistaro, – kaj ne nur – kiuj ankaŭ ekde informa vidpunkto ebligis la publikan prezenton de Esperanto kaj la kongreso en pluraj amaskomunikiloj, radiaj kaj televidaj programoj tutlandaj, kiuj informis pri ĝi dum tuta semajno, krom la aperigo en la retejo de la nacia informagentejo ACN.

La kongreso same estis bela kaj unika momento pro la fakto ke unuafoje en la historio de KEA, 12-membra karavano el usonaj esperantistoj sukcesis partopreni la kuban kongreson en kunfrata etoso, konfirminta la bezonon daŭre krei spacojn por ke nia interkultura praktiko senpera efektiviĝu kaj la translima amikeco plifortiĝu.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj pro la ĉesto amika kaj animinspira!



6-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio

**Malferma parolado
de Alberto Fernández-Calienes Barrios,
prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio**



Estimataj geamikoj!

Kiel vi povas rimarki ni ne ofte kongresas. Tiu ĉi estas nur la 6-a kongreso 36 jarojn post la refondo de Kuba Esperanto-Asocio en 1979. Ĉijare nia Asocio bezonis la okazigon de landa kongreso por montri al la kuba publiko la forton de nia movado, la rezultojn de nia plurjara agado en la tuta lando.

Hodiaŭ ni estas aparte fieraj pri la konsisto de nia kongresnaro. Ĝis nun aliĝis 134 kongresanoj el ĉiuj kubaj provincoj kaj gastoj el 10 landoj.

Niaj laboroj, tamen, ne komenciĝas hodiaŭ. La 17-an de novembro, okazis en la Hava-

na Universitato, danke al la persona engaĝiĝo de ĝia rektoro, d-ro Cobreiro, al kiu ni ĉi tie publike dankas, Internacia Simpozio kiun organizis nia Asocio kunaŭspiciita de la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko kaj la Centro pri Aplikata Lingvistiko en Santiago de Cuba, kun ĉeesto de lingvistoj, filologoj, profesoroj, tradukistoj kaj studentoj de fremdaj lingvoj. Tie prelegis niaj gastoj, profesoroj Charters, Fiedler kaj Raola sub la kunordigo de nia estrarano Juan Ramón Rodríguez Gómez.

La rezultoj de tiu simpozio estis tre pozitivaj kaj promesplenaj. La trafaj prezentoj de la prelegintoj alproksimigis la fenomenon Esperanto al kubaj fakuloj en tia grado, ke verŝajne en tre baldaŭa estonteco Esperanto eble fariĝos:

a) fakultativa studobjekto en universitatoj;

b) lingvo elektebla por enkonduko al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj;

c) elektebla studobjekto en iuj bazaj kaj mezaj lernejoj.

Tiuj estas sendube sukcesaj atingoj, kiuj postulas de ni nun pli altan lingvonivelon kaj



la trejnado de pli da instruistoj. La lingvon Esperanto ja povas instrui nur ni, esperantistoj. Alvenis la atendita momento reunigi ĉiujn fortojn por intensigi nian laboron sur ĉiuj frontoj. La pilko saltas nun en nia tereno!

Ankaŭ antaŭkongrese, nome la 18-an kaj 19-an de novembro, sesiis la 16-a Seminario por Aktivula Maturigo de Universala Esperanto-Asocio, internacie konata sub la siglo AMO. La seminarion kunordigis nia estrarano Maritza Gutiérrez González kaj por la antaŭviditaj temoj ni havis la plezuron kalkuli je tre altnivela prezentado fare de Orlando Raola, Julián Hernández Angulo, Norberto Díaz Guevara, Maritza mem, Duncan Charters kaj Vilhelmo Lutermano. Ni

tre ĝojis konstati, ke la intensajn laborsesiojn partoprenis pli ol 40 aktivuloj.

Nun staras antaŭ ni la kongresa temo "Lingvoj kaj kulturo: identeco en diverseco", kiun reĝisoras Maritza Gutiérrez González. Ni invitas vin aktive partopreni la diversajn programerojn kaj ankaŭ kapti la okazon kaj vikle praktiki la lingvon kun niaj eksterlandaj geamikoj.

Mi ne povas nun fini sen mencio de aparte kortuŝa fakto: Por la unua fojo, esperantistoj el granda najbara lando, kun ankaŭ tre granda E-tradicio, povas tute leĝe kaj eĉ karavane flugi al E-aranĝo en Kubo.

Troviĝas inter ni 12 reprezentantoj de tiu lando, por kiuj mi petas fortan aplaudon. Mi parolas pri Usono!

Fine de la pasinta jaro la prezidentoj de niaj landoj samtempe en Vaŝingtono kaj Havano anoncis al la mondo la decidon repreni la diplomatiajn rilatojn interrompitajn de 1961.

Tiu decido malfermas novajn eblecojn por ambaŭ landoj kaj ni, esperantistoj, kiuj de longa tempo tenis, eĉ se modeste, la kunlaboron inter niaj landaj asocioj kaj ankaŭ inter niaj asocianoj, ne povas resti je la nivelo de nur tre bonaj najbaroj, sed devas fariĝi ambasadoroj por la amikeco inter niaj popoloj. Mi certas, ke ni daŭre kaj bone flegos tiujn rilatojn.


Bonan kongresumadon!

Mi havas la honoron deklari la 6-an Kongreson de Kuba Esperanto-Asocio malfermita!



Sur la podio, de maldekstre: Prof. d-ro Duncan Charters (US), prof. d-rino Sabine Fiedler (DE), Alberto Fernández-Calienes, Maritza Gutiérrez, Ariadna García, estrarano de TEJO, Juan Ramón Rodríguez, Lucía Sardiñas (asistanto de la ministro pri Kulturo), Julián Hernández kaj Pedro Fernández. Fotoj: Elio Miranda Quintana.

Kongrese...



Sukcesa simpozio en la Havana Universitato

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

La 17-an de novembro, KEA organizis en la Havana Universitato, simpozio “Esperanto: lingvistika kaj socikultura fenomeno”, kunaŭspiciita de Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko (ILL) kaj Centro pri Aplikata Lingvistiko, kun partopreno de tri eksterlandaj prelegintoj kaj ĉeesto de deko da fakuloj el diversaj kubaj institucioj.

La simpozio celis montri nuntempan bildon pri la fenomeno Esperanto al kubaj lingvistoj ne esperantistoj, kaj ĉefajn atingojn de la lingvo nialande dum pli ol 100 jaroj, kies pioniroj estis d-roj Fernando Ortiz, Mariano Aramburo, Juan M. Dihigo, Julio Jover, inter aliaj elstaruloj de la kuba kulturo en la 20-a jarcento.

Por plenumi tiujn celojn, la organizantoj interkonsiliĝis kun la prelegintoj pri la traktotaj temoj, kiuj kovrus enhance kaj kvalite la tutan fakan laborkampon de la nuntempa esperanta agado. Rezultoj, jen la prelegoj:

- Prof. d-rino Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig, Germanio): “Superrigardo pri la fako kun fokuso pri la studado de Esperanta frazeologio”, en Esperanto kun interpreto de Maritza Gutiérrez González.
- Prof. d-ro Duncan Charters (Principia College, Illinois, Usono): “Universitata instruado de Esperanto: pasintaj spertoj kaj perspektivoj por la estonteco”, esperante kaj hispanlingve.
- Prof. d-ro Orlando Raola (Santa Rosa College, Kalifornio, Usono): “El Esperanto en el mundo actual”, hispanlingve.
- Juan Ramon Rodríguez Gómez (Kuba Esperanto-Asocio): “Pintaj atingoj de Esperanto en Kubo (1904-2015)”, hispanlingve, kiu ankaŭ reĝisoris la aranĝon.

Krom la tempodaŭro planita por ĉiu prelego (40 minutoj), oni planis pliajn 30 minutojn por debati pri ĉiuj aspektoj prezentitaj,

okazoj kiujn profitis la ĉeestintoj por esprimi siajn opiniojn kaj proponi konkretajn ideojn je diversaj flankoj. Inter ili, indas mencii jenajn:

- D-rino Nuria Gregori Torada, prezidantino de la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko proponis rubrikon pri Esperanto en la lingvistika gazeto de ILL, kaj krei la sekcion Esperanto ĉe la Kuba Asocio de Lingvistoj, pri kio konsentis d-ro Osvaldo Balmaseda Neyra, prezidanto de tiu ĉi lasta institucio.
- D-rino Mercedes Garcés Pérez (profesoro de la Filologia Fakultato en la Centra Universitato Marta Abreu) esprimis propran sindevontigon kaj tiun de sia kolegino, Mag. Yamilé Pérez García, ankaŭ ĉeestanta la simpozion, lerni Esperanton, ekstarigi kontaktojn kun esperantistoj de tiu provinco, lanĉi E-kurson en tiu institucio kaj proponi la lingvon por eblaj sciencaj eksploroj kaj

kiel alternativa studobjekto.

- D-ro Carlos Martínez, vicdekanano pri Esploroj kaj Postdiplomoj de la Universitato pri Pedagogiaj Sciencoj, proponis la instruadon de Esperanto en tiu institucio kaj teni ĝin en konsidero por eblaj estontaj esploroj.
 - D-rino Susana Arriola (fakulo pri instruado de Fremdaj lingvoj ĉe la Ministerio pri Edukado) konsideris la eblecon proponi al tiu organismo, eksperimente, la instruadon de Esperanto en kelkaj fremdlingvaj lernejoj en la lando.
 - Nancy Hernández Contreras (Direktorino de la Fremdlingva Eldonejo José Martí) proponis reaktivigi kontaktojn kun la eldona fako de KEA por eldoni libron en kaj pri Esperanto, kiel jam okazis dum la 80-aj jaroj; kaj malfermi la urbocentran bibliotekon Alma Mater (ĉe Infanta kaj San Lázaro, Vedado) por ĉiuj eblaj E-aranĝoj.
 - Rodolfo Alpízar Castillo (vicprezidanto de la Kuba Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj) proponis ke ĉiuj Esperanto-tradukantoj estos bonvenaj ankaŭ kiel membroj de tiu faka institucio.
- Aliaj ĉeestintoj en la simpozio, kiel d-rino Lucía Sardiñas

(Asistanto de la kuba ministro pri Kulturo) kaj Azalia Arias González (reprezentanto de la Kuba UN-Asocio) esprimis la sindevontigon lerni la lingvon kaj montris sian pretecon helpi je ĉiuj aferoj rilataj al Esperanto, ekde siaj respektivaj postenoj.

Ankaŭ ĉeestis la simpozion lingvoinstruistoj, dudeko da eksterlandaj geesperantistoj (el Belgio, Brazilo, Germanio, Kanado, Nederlando, Rusio, Usono), kaj gestudentoj de la Fremdlingva Fakultato ĉe la Havana Universitato inter aliaj interesitoj pri tiu ĉi temaro.

La enlandaj partoprenintoj ricevis ekzempleron de la scienca ĵurnalo, anglalingva, *Interdisciplinary Description of Complex Systems (Special Issue: The phenomenon of Esperanto)*, kun 12 artikoloj de diversaj aŭtoroj.

En siaj bonvenigaj vortoj kaj en la oficiala fermo de la simpozio, Alberto Fernández-Calienes Barrios, prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, dankis la ĉeestantojn kaj gastojn, kiuj pozitive reagis al la alvoko de la Asocio kun la celo proksimigi Esperanton al la scienca kaj faka agado en nia lando kaj samtempe familiarigi la kubajn fakulojn kun la fakaj kaj sciencaj valoroj de Esperanto.



Simpozio...



NOVAJ HONORAJ MEMBROJ

Laŭ interkonsento de la Komitato de KEA, en eksterordinara kunsido okazinta la 20-an de novembro 2015, ekde januaro 2016, la Asocio havas kvin novajn Honorajn Membrojn

JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ



Francisco Jesús Briel de Cañas (Havano, 1940.01.14, 75-jaraĝa). Eklernis Esperanton 1965 en Leipzig (GDR) kaj daŭrigis tiun lernadon en Havano (1968). Estis fondinto de Havana Esperanto-Grupo (novembro 1971) kaj membro de Havana Esperanto-Rondo (decembro 1972–junio 1974). Ekde 1972 estas individua membro de UEA kaj ekde septembro 1979, membro de KEA. En la 80-aj jaroj membris la KEA-Estraron kiel respondeculo pri organizo. Partoprenis ĉiujn KEA-kongresojn (1987, 1996, 1999, 2002, 2005 kaj 2015), la Internacian Konferencon Esperanto '88, la 23-an ILEI-Konferencon (Hanabanilla, 1990) kaj en la du UKoj okazintaj en Havano: 1990 (LKK-ano) kaj 2010, kaj la 6an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (Havano, 2004). Ekde 2001 estas Direktoro (por Latinameriko) de Monda Yumeiĥo-Societo, kaj fakdelegito de UEA.



Julio Martínez Fiallo (Havano, 1934.06.16, 81 jaraĝa). Eklernis E-on en septembro 1966 per koresponda kurso. Relernis la lingvon en kursoj organizitaj de Havana E-Grupo (novembro 1971–majo 1972) kaj Havana E-Rondo (septembro 1973–junio 1974). Membris la laborteamon por la fondiĝo de KEA (oktobro 1978–junio 1979) kaj la KEA-Estraron (ĝis 1986), kie sinsekve respondecis pri instruado, financo kaj publikaj kaj internaciaj rilatoj. En 1984, la Komitato de KEA nomumis lin Peranto de UEA en Kubo. Kunfondinto de la Esperanta Literatura Tradukmetiejo (ELT, 1988), ĉe la Nacia Unuiĝo de Verkistoj kaj Artistoj, UNEAC) kaj prezidanto de la Havana E-Klubo Juan Bacallao (1989-1992), pri informado. Partoprenis la 1-an, 2-an, 3-an, 4-an kaj 5-an KEA-kongresojn (1987, 1996, 1999, 2002 kaj 2005 respektive) kaj en la 75-a kaj 95-a UK-oj (1990 kaj 2010). Li estis UEA-delegito kaj fakdelegito (1990-1999 kaj 2000-2014).



Fernando Andrés Paredes Elósegui (Havano, 1946.04.07, 69 jaraĝa). Eklernis Esperanton novembre de 1971 kiel membro de Havana Esperanto-Grupo. Estis fondinto de Havana Esperanto-Rondo (oktobro 1972) kaj membro de ties Estraro. Ekde 1973 estas individua membro kaj delegito de UEA. Membris la laborteamon por la fondiĝo de KEA (oktobro 1978–junio 1979) kaj la KEA-Estraron (ĝis 1983), kie respondecis pri financo. Partoprenis ĉiujn KEA-kongresojn (1987, 1996, 1999, 2002, 2005 kaj 2015), la Internacian Konferencon Esperanto '88, la 75-an UK (1990), la 6-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto (Havano, 2004) kaj la 95-an UK (2010). Delegito kaj fakdelegito de UEA ekde 1984 kaj ĉefdelegito en du periodoj (1983-1990, kaj ekde 2014). Prelegis en pluraj E-eventoj en Kubo, kiel kongresoj, seminarioj pri apliko de scienco kaj tekniko, ktp. Diplomita Cseh-instruisto.



Andrés Pedro Rodríguez González (Havano, 1941.11.30, 73 jaraĝa). Eklernis Esperanton 1972 en kurso organizita de HER kaj ekinstruis en 1974. En tiu ĉi lasta jaro, kiam neoficiale fondiĝas KEA (17 aŭgusto), sen registara aprobo, li estis elektita vicprezidanto de la Estraro. Membras la komitaton kiu transprenas la klopodojn por la oficiala fondo de KEA, kaj la 16-an de junio 1979 oni elektas lin prezidanto, en kiu posteno li restis ĝis januaro 1986. Estis la unua oficiala reprezentanto de la nova KEA en UKoj (Budapeŝto, 1983, kie KEA aliĝis al UEA). En 1983-84, estis E-redaktoro ĉe la Fremdlingva Eldonejo José Martí, celante la eldonon de libroj en Esperanto. Fondinto en 1989 de Esperanta Literatura Tradukmetiejo ĉe UNEAC, ĉestas kvin KEA-kongresojn, en la 75-a kaj 95-a UKoj, ambaŭ en Havano. Ekde 2005 prizorgas la projekton Esperanto en Kulturaj Institutoj (EKI), en Santos Suárez, 10 de Octubre, Havano.



Jesús Andrés Castillo Jiménez (La Habana, 1937.10.15–2013.05.02). La Komitato de KEA decidis elekti lin Honora Membro *post mortem* pro la fakto ke, dum tre malgranda vivo kiel esperantisto (11 jaroj), li sukcesis atingi la plej altajn ŝtupojn. Li eklernis E-on en septembro 1979, komencis instrui la lingvon en 1981 kaj en la sekva jaro elektiĝis Direktoro de DEI (Direkto de E-Instruado). De 1986 ĝis 1990 li estis prezidanto de KEA kaj, en tiu etapo, okazis pluraj el la plej gravaj eventoj de la unua epoko de KEA: 1986 (Teknika Konferenco pri Esperanto, en la Kongresa Palaco, kun partopreno de Simo Milojević, Ĝenerala Direktoro de UEA), 1987 (partopreno en la 72-a, Jubilea UK en Varsovio, en reprezento de KEA, kaj unua KEA-Kongreso), 1988 (kreado de la E-redakcio en Radio Havano-Kubo); kaj okazigo de la Iberamerika Konferenco Esperanto '88, en la Kongresa Palaco) kaj 1989 (okazigo de la unua Kuba Kultura E-Festivalo, kaj fondiĝo de *Avanco*, oficiala organo de KEA). Tute aparta mencio meritas la jaron 1990, kiam sub lia gvido okazis en la Kongresa Palaco la 75a UK, sub la Alta Protekto de Carlos Rafael Rodríguez, tiama Vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra Konsilioj, kaj kun partopreno de Fidel Castro en la oficiala malfermo kaj speciala akcepto lia en la Palaco de la Revolucio, kie Castillo rekte interpretis la kuban prezidenton. Por tiu kongreso, oni sukcesis krei veran artan etoson en Esperanto, danke al famaj kubaj artistoj Beatriz Márquez, Miriam Ramos, Vicente Feliú, María E. Pérez, María L. García, Georgina Almanza, María Álvarez Ríos, kaj aliaj. Tiujare, ankaŭ okazis en Kubo la 23a Konferenco de ILEI kaj la 46a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiuj parte estis rezulto de lia intensa agado. Poste, pro personaj kialoj, li apartiĝis de la poresperanta agado en la lando, sed restis ĉe ni kiel la ĉefa motoro kiu puŝis la tiutempan KEA al novaj epokoj.



Zamenhof-Tago

KOMUNUMAJ VALOROJ

Okaze de tiu ĉi grava tago en la vivo de la esperantistoj en la tuta mondo, okazis en la Nacia Sidejo de KEA en Havano, kultura vespero kiu ankaŭ rolis kiel ferma renkontiĝo de la jaro 2015 en la kuba ĉefurbo. Kion multe aktualas la tradiciaj kaj kulturaj fonoj de tiu ĉi tago?

La Zamenhofa tago, la 15-an de decembro estas la naskiĝtago de la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en la Esperanto-kulturo. En tiu tago (aŭ en alia konvena semajntago ĉirkaŭ ĝi) esperantistoj okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon. La ideo de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhofa tago al Kristnasko instigas la kunvenintojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Kompreneble okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri Ludoviko Zamenhof.

Laŭ iniciato de unu el niaj plej signifaj verkistoj, Julio Baghy, ni festas je la 15-a de decembro ankaŭ la Esperantan kulturon. Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy proponis (Publika letero, 1931), ke la Zamenhof-tago estu ankaŭ la tago de la Esperanta libro, Esperanto-literaturo, kulturo.

Legemuloj, kleriĝemuloj pri la Esperantaj literaturo kaj kulturo aĉetu libron aŭ komencu legadon de nova esperanta libro, ankaŭ per tio celebru la E-literaturon je tiu tago.

La 15-an de decembro okazas ĉiujare pluraj agadoj, ekzemple en tiu tago la urbestro de Bjalistoko inaŭguris novan Zamenhof-centron. En Novjorko okazis simpozio omaĝe al Zamenhof kun prelegoj de Arika Okrent, Humphrey Tonkin kaj aliaj profesoroj. Unu jaron la serĉilo *Google* ornamis tiutage sian emblemon per la Esperanto-flago honore al la okazo (*Google Doodle*), kio igis proksimume 2 milionojn da personoj klaki ĝin kaj legi vikipedian artikolon pri Zamenhof aŭ Esperanto.

Hodiaŭ ekzistas kaj plukreskas abunda, tutmonda Esperanta literaturo (originala kaj tradukita), kiu same, kiel la lingvo mem celas disvastigi la diversajn kulturverkojn, kaj samtempe ebligi al alilingvanoj ĝui la verkojn de alietnanoj, tiel kontribuante al justa, egalrajteca komunikado, kun respekto al lingva kaj kultura justecoj, riĉecoj, diverseco kaj strebante al la konservado de tiuj.

Jen konservinda celebrado kiun nia asocio kundividus kaj festas.

Bonan Esperantan librotagon al la kuba esperantistaro!

Kompilo: M. Gutiérrez
(www.linguistic-rights.org/zamenhof-tago/)

Unesko kaj Esperanto

Omaĝo al Zamenhof



La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo, kun la ĝojiga decido priomaĝi d-ron Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, laŭ *Gazetara Komunikado* de Universala Esperanto-Asocio.

Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempan terorismajn atakojn, interalie meze de

la konferenca periodo en Parizo mem: “Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro”.

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L. L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos “asociita” en la periodo 2016-2017.

La propono estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA. (www.uea.org)

El Cienfuegos, la Suda Perlo



La Esperanto-Grupo de la centra provinco Cienfuegos, kun 27 membroj en 2015 ankaŭ festis la Zamenhof-tagon. Jen komuna foto de la grupo gvidita de Alina Zuaznabal Himely.



Intervjuo kun Tirso Ávila kaj Leonardo Luna

Geomar Martínez: Ĵus finiĝis la Zamenhofa Metiejo en provinco Guantánamo kaj nun mi estas ĉi tie kun du el la organizantoj de la evento, Tirso Ávila, instruanto, ĝenerala sekretario kaj respondeculo pri publikaj rilatoj; ankaŭ ĉe mi estas Leonardo Luna, instruanto kaj kasisto de la grupo. Ĉu vi povas paroli pri la Zamenhofa Metiejo, kio ĝi estas kaj kion ĝi celas?

Tirso Ávila: La Zamenhofa Metiejo estas renkontiĝo por kunigi homojn el la tuta lando kaj omaĝi la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto; ĝia celo estas evoluigi kaj dis-

konigi Esperanton, ankaŭ plialtigi la parolkapablan nivelon de la esperantistoj.

GM: Kiuj estas la rezultoj kaj perspektivoj post 20 jaroj?

TA: Ĝis nun, 20 jarojn poste, la Zamenhofa Metiejo, jaron post jaro, kreskigas ĉe interesitoj la emon partopreni alportante prelegojn kaj kulturajn kontribuojn. En ĝi ni inkluzivas la komunumon kaj la bazlernejon de Yacabo Abajo. La perspektivo estas pli profesia cele kapti la atenton internacie.

GM: Kiel la Zamenhofa Metiejo garantias la celojn de KEA kaj UEA?

Leonardo Luna: Laŭ mi, oni garantias la celojn de KEA kaj UEA per informoj nacie kaj internacie, pere de paroligaj kursoj kaj kulturajoj kiuj riĉigas la Esperantan kulturon. Ni informas la publikon per nia bulteno *Famo* en Esperanto; por ne esperantistoj ni uzas la provincan radiostacion, la televidan sistemon, ĵurnalon kaj baldaŭ aperos retpaĝo kiu havos plurajn informojn pri tio; krom tio, ni bezonas pli da subteno flanke de la Nacia Estraro de KEA.

GM: Antaŭ kelka tempo naskiĝis projekto en la komunumo Yacabo Abajo, pri kio ĝi temas?

LL: La projekto nomiĝas *Komunuma Esperanta Familio*, kiu naskiĝis en la jaro 2012 pro la agado de niaj esperantistaj naturamantoj, unue por la plantado de arboj uzante lokajn specimenojn, sed nun estas inkluzivigita la komunumo per la baptopatrado de lernejo, specife de lerneja grupo. Ni instruas Esperanton danke al la komunuma projekto kaj ankaŭ stimulas koni la naturon. Ni instruas al ili ĉiam en Esperanto.

GM: Dankon al vi ambaŭ!

Tiu ĉi intervjuo de Geomar Martínez por la esperantlingva programo de Radio Havana Kubo estis elsendita la 20-an de decembro 2015.

(Transkribo de la redakcio).

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.co.cu
www.esperanto.cu/cu



32-a KOMITATKUNSIDO Kuba Esperanto-Asocio

Santa Clara, Villa Clara
16 marto 2016



RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj

www.radiohc.cu/eo



esperanto.cu estas trimonata bulteno por komitatoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. PDF-versio elŝuteblas. **Redaktis:** Maritza Gutiérrez. **Enpaĝigis:** Enrique Mayol.

